oficiala… kiel ĉiuj aktlibraj raportoj, la dua estis speciale verkita por ties publikigo en la dua numero de **Heleco**. Ĝia teksto estas pli libera aŭ pli ĝuste, sprita, bonhumora… Paradokse, la dua respegulas pli bone ol la unua la etoson kaj la intervenojn de la kunsido. La legantoj de la retpaĝo de nia **Astura Esperanta Asocio** povos ĝui tiun tekston kiam la kompleta kolekto de **Heleco** estos metita en la interreton.

Nun, pri tiu kunsido ni diru ke en ĝi oni elektis novan estraron de la Grupo Esperantista Jovellanos. Verdire, tiu komitato restis tia kia ĝi estis antaŭe sed kun la aldono de tri novaj voĉdonantoj: Antonio Román Cantón, Julio Argüelles García kaj Ildefonso Domínguez Losada. Julio Argüelles estis antikva membro de la Grupo; li esperantiĝis, same kiel Santiago Mulas, jam en la kurso 1958-1959, gvidita de Alberto Menéndez. La du ceteraj esperantiĝis en kursoj poste gviditaj de S. Mulas.



Kurso 1978-1979

Ildefonso Domínguez dediĉiĝis poste, dum multaj jaroj, al la ellaborado de la revuo **Heleco** (la unua numero estis ellaborita de Vicente González). **Heleco** komence estis nur ok-paĝa broŝureto; poste, subkontrole de Ildefonso ĝi iompostiom pligrandiĝis kaj pliboniĝis.

Estis multaj novaj gelernantoj en la E-kruso 1977-1978. Kelkaj membroj de la E-grupo planis partopreni en la Universala E-kongreso de 1978 en Varna (Bulgario). Por kontribui al la pago de la vojaĝo, la grupo decidis fari lotadon de Kristnaska korbo; simila lotado estis farita la antaŭan jaron.

La 7an de aprilo de 1978 estis Ĝenerala Asembleo de la membraro de la E-grupo por pritemi la formon disdoni la monhelpon de la E-grupo al la membroj kiu ĉeestos la E-kongreson en Bulgario. Sed komence la Prezidanto informis ke la estraro de la **Ateneo Jovellanos** komunikis al li ke la esperantista grupo estas akceptata de la **Katedro Jovellanos pri Universitata Disvastigo** kaj ke pro tio oni asignos al ni iun ejon en la plejsupera etaĝo de la konstruaĵo.

Dum tiuj jaroj: 1977, 1978, 1979… la Grupo de Esperanto normale funkciadis; estis kursoj, la estraro kelkfoje kunsidis por la normalaj aferoj de la organizaĵo kaj eĉ estis plurfoje kunvokita la ĝenerala asembleo de la membraro por preni iujn decidojn, oni sendis notojn al la presaro informante pri nia agado… Sed estas ĉefe menciinda la fakto ke eĉ la membroj de la grupo kiuj ne partoprenadis la kursojn, regule vizitadis la ejon de la grupo por praktiki la lingvon kaj helpi se necese. Por mezuri la bonan sanon de iu esperantista rondo utilas ne nur la E-kursoj kiujn ĝi organizas kaj la nombro de ties partoprenantoj sed ankaŭ la ofta partopreno de la membraro de la asocio en ĉi ties taskoj. Tiurilate, en tiu epoko la sano de la **Grupo Esperantista Jovellanos** estis tre bona.

En kunsido de la estraro, la 4an de julio 1978 oni decidis proponi kiel kandidato de Asturio al la estraro de **HEF**, samideanon el nia grupo, Adonis G. Meana.

Ne malpli ol 7 membroj de nia esperantista grupo de Gijón partoprenis en la Universa Kongreso de Esperanto en Varna, kiu, cetere, estis tre grava kaj sukcesa. En kunsido de la grupo, la 7an de septembro, oni informis pri tiu esperantista evento en Bulgario. Ĉeestis ĝin la Prezidanto S. Mulas, la Vicprezidanto Adonis G. Meana kaj aliaj gesamideanoj. En tiu sama kunveno oni decidis proponi al la Asembleo de **HEF** ke Gijón estu la sidejo de la **Hispana Kongreso de Esperanto** de la jaro 1979.

Ekde julio de la jaro 1976 ĝis oktobro de 1979 estis eldonitaj ne malpli ol 9 numeroj de **Heleco**. Kiel informo-fonto por nia historio, ekde tiu epoko ni disponas ankaŭ de tiu revueto, kiu, kvankam ĝia celo ne estis raporti nur pri la agado de la grupo sed pritrakti ĉiun ajn temon, tamen ĝi utilas ankaŭ por trasekvi la spurojn de la vivo de la E-grupo. Krome, estas ankaŭ la viva memoro de tiuj ni, kiuj jam travivis tiun epokon de la esperantista rondo.

En oktobro de la jaro 1978 komenciĝis en nia sidejo du kursoj de Esperanto: unu **Baza Kurso** gvidata de Santiago Mulas kaj alia **Progresiga Kurso**, gvidata de Adonis González Meana, por tiuj gelernantoj de antaŭaj bazaj kursoj, iuj el kiuj jam posedis la titolon de Kapabla Esperantisto.

La **38a Hispana Kongreso de Esperanto** de tiu jaro 1978 okazis, en dato pli malfrua ol kutime, en la urbo Leono. El nia urbo partoprenis en tiu kongreso sufiĉe granda nombro da gesamideanoj. En la tiea kaj tiama Ĝenerala Asembleo de **HEF**, La Prezidanto de la grupo Jovellanos, Santiago Mulas, proponis la urbon Gijón kiel sidejo de la sekva landa E-Kongreso. La Asembleo aprobis tiun proponon, do, nia E-grupo pretiĝis por organizi tiun gravan esperantistan eventon.